

*Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj LEK membroj kaj amikoj!*

Bulteno de la

Londona Esperanto-Klubo

2020  
jan-feb

### **Kluba Programo:**

#### **januaro:**

- 3 Neniu kunveno
- 10 Novjara Festo (Dioramo) – vidu anoncon
- 17 Socia Vespero (IBIS Shoreditch)
- 24 John Greenwood: *Rhodes kaj la unua Esperanto-grupo en Britujo* (Dioramo) (1800h Konsilantaro)
- 31 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)

#### **februaro:**

- 7 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)
- 14 John Wells: *Lingva Seminario* (Dioramo) (1800h Konsilantaro)
- 21 Socia Vespero (IBIS Shoreditch)
- 28 Vespermanĝo en restoracio Chutneys, Drummond St.  
**Anoncu vian ĉeeston al Daniel Hayon [danielhayon@hotmail.co.uk](mailto:danielhayon@hotmail.co.uk) antaŭ la 8-a de februaro.**

#### **marto:**

- 6 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)
- 27 Jarkunsido


### **Esperanta Kalendaro:**

25 jul – 1 aŭg: 105a Universala Kongreso de Esperanto, Montreal, Kanado.  
<https://esperanto2020.ca/eo/chefpagho/>  
17-19 aprilo: 101a Brita Kongreso, Big Shed Conferences, Leicester. <https://britakongreso.org/>

### **Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a februaro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*



John Greenwood, nia gastpreleganto en **24 januaro**, kaj la temo de lia prezento, Joseph Rhodes

### **NOVJARA FESTO DE LEK – 10 januaro**

La klubo festos komencon de nova jaro kiam ĝi unuafoje renkontiĝos, t.e. en 10a de januaro. Tia anonco probable sufiĉas, se vi jam antaŭe partoprenis en kluba Festo, sed unuafojaj partoprenontoj nepre plulegu!

Rajtas partopreni, sen devigo ion pagi, (tamen kun surloka eblo iom libervole donaci) ĉiu klubano, kaj alia(j) esperantisto(j) kiu(j) en tiu vespero ial vizitas la klubon. Ankaŭ partnero kaj/aŭ proksima familiano de klubano estus bonvena, sed tiu komprenu, ke eventualajn anoncojn, ludojn aŭ konkursojn oni faros nur en Esperanto.

Kvankam antaŭa sinanonco estas neniel deviga, tamen helpus la organizantojn simpla indiko, ke vi esperas ĉeesti. Pri tiuj, kiuj levis manon dum ĵusa Zamenhofa Vespero oni jam scias, sed aliaj afable mesaĝu al [terry\\_page@btinternet.com](mailto:terry_page@btinternet.com) Bonvolu tion fari ankaŭ ĉiu, kiu intencas kontribui al la Festo per alporto de manĝaĵo(j), por ke oni povu laŭe plani bufedon. Koran dankon!

### **JARKUNSIDO 2020**

**La venonta jarkunsido de LEK okazos vendredon la 27-an de marto 2020 je 19.15 ĉe Old Diorama Arts Centre, 201 Drummond Street, NW1 3FE.**

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:  
Old Diorama Arts Centre, 201 Drummond Street,  
NW1 3FE (por kunveno kun programo);  
Ibis London City - Shoreditch Hotel, 5 Commercial  
St, London E1 6BF (por diskutvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:  
18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido  
19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero  
20:15 - 20:45 paŭzo  
20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la  
ĉefprogramero  
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria",  
"Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City",  
"Circle"), Regents Park ("Bakerloo").  
Fervojo London Overground: Euston  
Busoj: 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390, 453.  
Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East - uzu la  
eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith &  
City", "District"); Aldgate (linioj "Circle"  
"Metropolitan").  
Busoj: 15, 25, 115, 135, 205, 242, 254.


Kotizoj: £15 jare; fora membro: £9 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346  
rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo  
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre);  
Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet,  
Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.



## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Do, la jaro 2019 finiĝas, kaj 2020 komenciĝas.

Mi opinias, ke 2019 estis bona jaro por LEK. Unue, ni okazigis multajn interesajn kunvenojn. Certe, la diverseco de la temoj estas notenda! Ni ĝuis prelegojn pri Italujo, pri Slovakujo, pri UEA, pri UN, kaj pri Krubaloj!



Ne nur prelegoj, sed ankaŭ aliaj okazoj rolis grave dum la jaro. Ĉe la komenco de la jaro, okazis la novjara festo, kaj multaj LEKanoj ĉeestis la kluban vespermanĝon en februaro. Ni promenis laŭ la Tamizo en junio. Ankaŭ okazis kelkaj literaturaj kaj lingvaj vesperoj, kiuj donis al ni eblon plibonigi niajn sciojn pri Esperanto kaj ĝia literaturo.

La nombro de ĉeestantoj ege variis. La maksimuma nombro da ĉeestantoj estis proksimume tridek, la minimumo estis nur du. Mi esperas, ke la kvanto pligrandiĝos dum 2020, kaj baldaŭ ni demandos vin pri kiel ni povus fari la eventojn pli allogaj al la anoj.

Mi certas, ke vi taksos la unuan okazon de 2020 alloga. La Novjara Festo de LEK estas ĉiam ĝuinda eblo renkonti kaj kunbabilo la LEKanojn, do mi esperas, ke vi povos ĉeesti!

Do mi deziras al vi ĉion bonan dum 2020, kaj mi esperas, ke LEK liveros multe da tiuj bonaĵoj!

*Chris Lewis*

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.  
Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Roland England, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: Renato Corsetti: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ  
ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com,  
anica\_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.